



Informilo *por* Interlingvistoj

n-ro 122 (1/2023) ♦ 32-a jaro (tria serio) ♦ ISSN 1385-2191

*Eldonas: Esperantic Studies Foundation (ESF) en la nomo de
la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED)*

www.esperantic.org esfacademic.org esfconnected.org interlingvistiko.net
[@esperanticsf](https://twitter.com/esperanticsf) [@esfacademic](https://twitter.com/esfacademic) www.facebook.com/esperantic

ENHAVO

Artikoloj 3

Numismatiko: ne plu kaŝita trezorujo de la Esperanto-kulturo (3)	3
Sandokan, la Tigro de Mompraĉem	6
Komunumo solidariĝas pri sia lingvo	8
Esperantismo en Iberio: naciismo kaj internaciismo (1887–1928)	10
Ciferecigo de kroataj gazetoj kunfinancita de ESF	12
De Esperanto ĝis Dothraki: libreccenzo (2)	13

Bulteno 17

Internacia Konferenco de Aplikata Lingvoscienco	17
Nova libro pri Esperanta morfologio	17
Konferenco pri edukado, literaturo kaj lingvo	17
Beboj kaj kontrastaj sonoj	18
Ŝekspiraj mitoj	18
Atentu vian lingvon	18
Al lernas homlingvajn strukturojn	18
Pensado per la manoj	19
3-a Virtuala Kongreso kaj Retoso	19
Oratora Konkurso	19
Surloke kaj distance, serioze kaj amike	20
Ŝanĝi la difinon de amo	20
La estontecto de lingva diverseco	20
IKU-prelegoj petataj por Torino	20
Marjorie Boulton: Unu animo homa	21

Al starigas demandojn pri denaska gramatiko	21
Albeba parolado similas en multaj lingvoj	21
Lingvistiko kaj falsaj novaĵoj?	21
La potenco de lingvoplanado	22
Povo, volupto kaj zinko	22

Stipendioj de ESF 23

Numismatiko: ne plu kaŝita trezorujo de la Esperanto-kulturo (3)

Bert Boon

<https://esfconnected.org/2022/10/10/numismatiko-3/>



Numismatiko estas multe pli ol nur kolektado kaj laŭscienca priskribado de objektoj. Moneroj kaj medaloj prave estu konsiderataj kiel veraj artefaktoj, elpensitaj, kreitaj kaj fabrikitaj de artistoj kaj medalistoj, kiuj tre ofte estis ankaŭ lertaj desegnistoj, skulptistoj ktp.

Samtempe numismatikaĵoj ilustras kaj pliriĉigas la ĝeneralan historion de la homa kulturo kaj tiun de specifaj sociaj grupoj, kiel la esperantistaro. Numismatiko do povas funkcii kiel helposcienco de la historio, de la arto, de la sociologio, de la psikologio ktp. Diversaj universitatoj havas prinumismatikan fakultaton, kiel tiu de Vieno, abonanto de la revuo de la Esperanto-Numismatika Asocio.

Diversspecaj esperantaj medaloj prilumas el diversaj vidpunktoj gravajn momentojn kaj eventojn de la pasinteco, rilate al la esperanta movado, kaj daŭre memorigas pri homoj, kiuj grave rolis en la evoluigado de nia internacia senlima kulturo.

Tial ne estas mirinde, ke oni povas distingi laŭcele diversajn specojn, kiuj karakterizas aspektojn de Esperantujo, malgraŭ ĝia diaspora karaktero. **Ili tiel prilumas ekzemple gravajn**

► **personojn:**



Milda Jakubcová (1899-1979); L. L. Zamenhof (1859-1917); L. Sinha (1905-1977)

► eventojn kaj agadojn:



premio Ada Sikorska; ĝemelaj urboj Massa / Bad Kissingen; UK Budapeŝto 1983

► datrevenojn:



Esperanto 1887-1987; 1945-85 venko super la hitleranoj; okdekjariĝo de Esperanto (1887-1967)

► diversajn aliajn aspektojn:



unika manfarita medalo; duobla jubileo



nacia kongreso Dresdeno; Radio Polonia



medicinisto-esperantisto doktoro Henri Dor

Ĉi tiu “ekspozicieto” montras nur la pinteton de la pinto de konsiderinda numismatika “glacimonto”, trezorujo nepre malkovrinda kaj riĉa je belaĵoj.

La legantoj de ĉi tiu blogo, kiuj iĝis scivolaj dum la legado, estas petataj sendi al la Esperanto-Numismatika Asocio (ENA; adreso: bert.boon@skynet.be) la peton ricevi aktualan **provekzempleron** de *Esperanta Numismatiko* aŭ tuj aliĝi kaj aboni la **nur retan** revuon (ekde la unua numero!), senĉese **senpage** kaj ĉiam **senkoste** ĉesigebla.

ENA havas aktuale 153 individuajn kaj 25 asociajn membrojn en 45 landoj kaj en ĉiu kontinento. La fakgrupo estis fondita en 2012.

Baza bibliografio (verkoj de Hans Jankowski)

- ◆ *Esperanto-medaloj + moneroj*. Aŭtora eldono (1990), 18 p.
- ◆ *Esperanto-medaloj: 1912-1995*. Aŭtora eldono (1995), 32 p.
- ◆ *Esperanto-mono: ilustrita historio pri universala monosistemo*. Auŝra. Kaunas. 2000 (2-a eldono), 32 p.
- ◆ *Esperanto-poŝtmarkoj: 1912-2001*.

Mag. Fil. Bert Boon estas belga esperantisto, la iniciatinto de Esperanto-Numismatika Asocio, ĉefredaktoro de la revuo Esperanta Numismatiko kaj fakdelegito de UEA pri numismatiko.

Sandokan, la Tigro de Mompraĉem

Alessandra Madella

<https://esfconnected.org/2022/10/31/sandokan-tigro-momprachem/>

<http://esperanto.cri.cn/recomended2/3842/20220126/731218.html>



Ĉi tiu artikolo de Alessandra Madella, kiu unue aperis en la retejo de Ĉina Radio Internacia en januaro 2022, reaperas ĉi tie laŭ afabla permeso de la aŭtoro.

En la jaro de la tigo laŭ la ĉina kalendaro, ni povas memori aventuran heroon je tigra karaktero tre amatan de italoj kaj multe da aliaj homoj tra la mondo. Temas pri la bela, longhara, kuraĝa kaj grandanima pirato Sandokan, protagonisto de la barat-malaja ciklo de aventur-romanoj el la plumo de Emilio Salgari (1862-1911). La itala verkisto, fakte, kromnomis sian heroon “Tigro de Malajzio” aŭ “Tigro de Mompraĉem” el la nomo de la duonvera kaj duon-fantazia insulo en la malaja insularo. Ĝi estas la nekonkerebla rifuĝejo de Sandokan kaj de liaj piratoj, la aŭdacaj kaj plur-etnaj “Tigridoj”, kiuj estas pretaj sekvi sian junan estron ĉien. Ilia plej granda honoro estas protekti lin per sia korpo ĝismorte dum la plej danĝeraj bataloj.

Tri tigras kapoj kun malfermitaj faŭkoj ornamas la ruĝan flagon de Sandokan kaj sentigas timon al malamikoj. Kiel tigo, li ne hezitas sole ataki multnombrajn armitajn virojn, sed li same kapablas sin regi kaj resti kaŝita en la ombro, se ne estas ŝanco venki. Simila al sovaĝa besto, li estas forta, svelta kaj proksima al la naturo, kiun li konas tre bone. Eĉ vundita kaj febrohava, li kapablas sin savi en la ĝangalo kaj pretervivi per ĝiaj fruktoj. Li soifas je sango, sed lia venĝo nur celas la anglajn, nederlandajn kaj hispanajn koloniistojn, kiuj forprenis lian regnon kaj mortigis liajn patrinojn kaj gefratojn. Male li donacas manplenojn da diamantoj al ĉinaj maristoj, kiuj sin defendas honorplene de liaj atakoj. Kaj li protektas el perfortoj kaj ekspluatado la lokajn loĝantojn, kiuj dankeme helpas lin kaj liajn homojn.



La sola malforta punkto de Sandokan estas lia romantika koro. Preskaŭ kiel heroo de itala opero, li neeviteble enamiĝas kontraŭ sia volo je la nevino de brita malamiko, eĉ sciante, ke tiu amo endanĝerigos ĉiujn liajn revojn kaj kredojn. Fakte, la deksejara belulino Marianna estas nur parte brita, ĉar ŝi naskiĝis sub la vulkano kaj la lazura ĉielo de Napolo en suda Italio, el kie venis ŝia patrino. Ekde ŝia junaĝo, ŝia oficira onklo konigis al ŝi la malkomfortojn de la marista kaj soldata vivo. Sed ŝi mem lernis la inajn delikatajn artojn, tiel ke ĉiuj nomas ŝin la “Perlo de Labuano”. Sandokan, pli aĝa ol ŝi je 10 jaroj, estis jam allogita de ŝia famo antaŭ ol vidi ŝin. Sed li estas tutanime kaptita, kiam ŝi kuracas liajn vundojn kaj sentime reciprokas lian amon. Li ne hezitas lukti kun tigo nur per sia kriso (ponardo) por impresi ŝin. Kaj li klopodas ĉiumaniere forrabi ŝin al Mompraĉem, kvankam li konscias, ke tio povus signifi la finon de lia pirata kariero kaj tute malebligi lian venĝon.



Sandokan kaptis la imagkapablon de italaj geknaboj ekde sia unua apero en 1883 sur la paĝoj de ĵurnalo de la nord-itala urbo Verona, kie Salgari naskiĝis kaj laboris kiel kronikisto. La unua libro de la ciklo estis publikigita en 1900 sub la titolo “La Tigroj de Mompraĉem” (itale, “Le Tigri di Mompracem”). Sekvis deko da sukcesaj aventur-romanoj fare de la sama aŭtoro kaj pliaj fare de


lia filo Omar kaj aliaj ĝis post la dua mondmilito.

En 1976 la itala reĝisoro Sergio Sollima realigis mini-serion pri Sandokan, kiu restas ankoraŭ nun la plej vidita programo en la historio de la itala televido kaj estis vaste sukcesa ankaŭ eksterlande. Ĉefrolis en ĝi la barata sika aktoro Kabir Bedi, kiu iĝis tre fama en Italio kaj eĉ lernis paroli la italan.

En 2010 la hispan-devena meksika verkisto Paco Ignacio Taibo II reprenis la rakonton kaj la heroojn de Salgari en sia libro “La reveno de la tigroj de Malajzio” (hispane “El retorno de los tigres de la Malasia”). Por tiu engaĝita aŭtoro, kiu verkis interalie biografion de Ernesto Che Guevara kaj eseon pri la historio de komunismo en Meksikio, Sandokan ĉiam reprezentas la plej pasian kaj entuziasman formon de kontraŭ-imperiismo kaj la nun maljuniĝintaj piratoj povas ankoraŭ efike lukti por tiu kaŭzo.

Salgari vivis samtempe kun aliaj eŭropaj verkistoj pri aziaj landoj, kiel Joseph Conrad (1857-1924), kiu vojaĝis kiel maristo al Borneo kaj Malajzio, aŭ kiel Rudyard Kipling (1865-1936), kiu naskiĝis en Barato kaj longe loĝis tie. Sed la itala verkisto, kiu devis forlasi siajn studojn por iĝi kapitano por transmaraj vojaĝoj, neniam iris pli malproksimen ol Brindisi, haven-urbo en suda Italio. Li trovis inspiron en la ekzotika modo, sed li ĉefe solece esploradis en bibliotekoj kaj muzeoj, kiel tiu pri Natura Historio en Torino. En tiu nord-itala urbo, kiu gastigos la Universalan Kongreson de Esperanto en 2023, li fakte pasigis la lastajn jarojn de sia vivo kune kun sia familio kaj grupeto de aliaj malriĉaj, drinkemaj kaj ŝercemaj artistoj popole konataj kiel “bohemia”.


En niaj nunaj jaroj de pandemio homoj devis al kutimiĝi nur reŝi pri foraj vojaĝoj, kiuj ofte estas neblaj aŭ tro malfacile realigeblaj pro la mondaj sankondiĉoj. Eble pro tio verkisto je nehaltigebla imagkapablo kiel Salgari iĝis denove tiel populara. Nova eldono de la romanoj de Sandokan aĉeteblas en italaj ĵurnalvendejoj ekde somero 2021. Kaj ekde februaro 2022 la itala televido realigis modernan daŭrigon de la fama serio kun la turka aktoro Can Yaman kiel ĉefrolulo kaj pli da atento al la ina vidpunkto en la pentrado de tiu amrilato inter Eŭropo kaj Azio. Espereble la forto de la Tigro de Malajzio helpas nin sekure vidi la finon de la kronvira pandemio en la jaro de la tigo laŭ la ĉina kalendaro kaj imagi pli justan mondon por pli pozitive interkonektata estonto.



Komunumo solidariĝas pri sia lingvo

The Eastern Door

<https://esfconnected.org/2022/11/14/mohoka-lingvo/>



Ne estas sekreto, ke multajn indiĝenajn lingvojn tra Testuda Insulo [= Nord-Ameriko] minacis koloniismo, kaj *Kaniens'kéha* – pli vaste konata kiel la mohoka lingvo – ne prezentas escepton.

Antaŭ nur kelkaj generacioj multaj *Kahnawa'kehrónon* – anoj de la mohoka popolo *Kaniens'kehá:ka* de Kanavakeo [*Kahnawake*, apud Montrealo en Kanado] – parolis la mohokan denaske. Tamen nun la plej multaj mohokoj flue parolas nur la

anglan – aŭ, fojfoje, la francan, kiu regas en la kebekaj komunumoj ĉirkaŭ Kanavakeo.

Kiel tio okazis? Multaj komunumaj plejaĝuloj, kies pli maljunaj parencoj estis denaskaj parolantoj, rakontas simile. En multaj okazoj oni devigis ilin aŭ la parencojn loĝi en lernejoj aŭ dumtage vizitadi indianajn lernejojn, kie oni sisteme ŝtelis de ili la kulturon – kie parolantoj de la mohoka estis ne kuraĝigataj sed punataj.

Nuntempe la afero staras malsame. Pasiaj komunumanoj en Kanavakeo laboras sendepende aŭ per komunumaj organizoj por revivigi kaj revigligi la mohokan, endanĝeran lingvon, kiu nun havas malpli ol 3500 flujajn parolantojn en la mondo.

Kanavakeo havas la propran porinfanan televidaĵon en la mohoka, inspirita de *Sesame Street* – *Tóta tánon Ohkwá:ri* – per kiu oni povas distriĝi lernante la lingvon. Pluraj lernejoj proponas “mergan” kurson por almenaŭ kelkaj niveloj.

En la Lingvo-Nesto *Iakwahwatsiratátie*, patrinoj kaj iliaj infanoj kunlernas la mohokan uzante nur tiun lingvon. Tio instigas al tutaj familioj ĝin lerni kaj uzi.

La Centro de Lingvo kaj Kulturo *Kanien'kehá:ka Onkwawén:na Raotitióhkwa* proponas diversajn lingvajn iniciatojn, inkluzive la programon *Ratiwennahní:rats* por mergi plenkreskulojn en la lingvo, kie kelkaj mohokoj dediĉas du jarojn de la vivo al tuttempa lernado de la lingvo.

Sed kompreneble la eblo fari tion ne venas al ĉiuj. La plej multaj tamen faras, kion ili povas. Vortoj kiel *niá:wen* (dankon) kaj *kwe* (saluton) ĉieas. Multaj homoj elektas nomi sin kaj siajn infanojn en la mohoka lingvo.

Ankaŭ la ĵurnalo *La orienta pordo* (*The Eastern Door*) laboras por helpi. “Ni provas kion eble plej transdoni la mohokan al niaj filo kaj filino, do por mi, temas pri io persona, persona vojaĝo, persona batalo por la lingvo”, diris Steve Bonspiel, redaktoro/eldonanto de *La orienta pordo*.

Bonspiel, progresanta parolanto, prioritatis la uzadon de la komunuma ĵurnalo por kontribui al la laboro de la komunumo por certigi, ke estontaj generacioj de mohokoj kreskos kiel denaskaj parolantoj.

“Nur malgrandan rolon ni ludas, sed mi ĉiam pensas pri la pli daŭraj efikoj, kaj kiel tio atingos homojn poste.”

Lastatempe aldonita paĝo “Kundividi niajn rakontojn” enfokusigas prezentojn de la rakontoj de komunumaj plejaĝuloj, sed samtempe donas al mohokoj la eblon legi la mohokan apud anglalingvaj versioj por vidi la lingvon en kunteksto.

Aparta paĝo dediĉita al la diskonigo de vortoj, neformale nomita la mohok-vorta paĝo, estas konstanta ero en *La orienta pordo* dum pli longa tempo, ekde 2020. Ĝi restas nepra parto de la laboroj de la ĵurnalo por subteni la lingvon.

Ĝi estas uzata de komunumanoj kiel Victoria Ann McComber, kiu eltranĉas la vortojn el la ĵurnalo kaj algluas ilin dise tra sia domo por klopodi kunfandi ilin en sian ordinaran vivon.

“Mia praavo parolis nur la mohokan, do ni lernis etajn ĉiutagajn vortojn ankaŭ de miaj geavoj”, McComber diris. “Miaj patrino kaj patro estis fluaj, do oni ĉiam parolis tiel. Ni lernis, kion ni povis, ne tre flue, sed sufiĉe por elturniĝi. Poste ni alvenis al la mezlernejo – kaj paroli tiulingve estis malpermesite.”

Ŝiaj edzo kaj filo scipovas paroli, do ŝi aplikas la vortojn, kiujn ŝi lernas. “Foje mi eraras kaj diras ion tute alian kaj ni ridas”, ŝi diris.

La mohoka estas grandega socia, eduka kaj politika prioritato en Kanavakeo, kuna prioritato de preskaŭ ĉiuj. Inter baraktado kontraŭ daŭraj kontraŭlingvaj atakoj fare de eksteraj registaroj, la mohokoj estas unuigitaj de deziro revigligi lingvon, kiu helpas formi la identecon de *Kanien'kehá:ka*.

Esperantic Studies Foundation donis iom da mono por helpi tiun laboron.

Esperantismo en Iberio: naciismo kaj internaciismo (1887–1928)

Pilar Requejo de Lamo

<https://esfconnected.org/2022/11/28/esperantismo-iberio/>



La bildo montras esperantistojn en la kataluna danco “La Sardana”.

Malgraŭ la antaŭa kaj ankoraŭa unikeco de esperantismo, ĝi ne evitis interagi kiel socia fenomeno kun aliaj gravaj movadoj tra la historio. Tre malsame ol ia stranga okazaĵo izolita de aliaj kulturaj, sociaj, politikaj, religiaj kaj ekonomiaj influoj, esperantismo interplektiĝis kun tiuj per la laboroj de siaj anoj, kiuj kunportis siajn idealojn. Tian diversecon oni povas agnoski de ĝia komenco en malsamaj partoj de la mondo, kiam en la malfrua 19-a jarcento Esperanto enradikiĝis en multnombraj komunumoj. Detala ekzamenado de kelkaj regionoj eble prilumos apartajn tendencojn, kiujn rigardantoj al la vasta bildo iel ne rimarkas, kiel ekzemple la fortan rilaton inter naciismo kaj esperantismo en la Ibera Duoninsulo inter 1887 kaj 1928.

Mia doktora projekto, “Inter internaciismo kaj naciismo: La Esperanto-movado en la Ibera Duoninsulo en la frua dudeka jarcento”, esploras la evoluojn de esperantismo en tri iberaj nacioj – Hispanio, Katalunio kaj Portugalio – kaj kiel ĝi profunde kuntordiĝis kun la ekpaŝantaj naciismaj movadoj de tiu regiono. Efektive la rilatoj inter la grupoj iĝis streĉitaj, kiam la internacian, pacisman kaj homaranisman naturon de Esperanto defiis la kompleksa jama hierarĥio de la nacioj.

Naciistoj kun intereso pri la helplingvo baldaŭ malkovris ĝian eventualan kapablon disvastigi iliajn naciajn kulturojn kaj lingvojn tra la terglobo laŭ maniero, kiu rajtigus ilin komplete regi la enhavon kaj kvaliton de siaj produktaĵoj sen devi dependi de komplikaj kaj fremdaj naciaj lingvoj. Tiu nova transnacia legantaro ne nur alparoleblis per revuoj, sed ankaŭ tre deziris lerni pri la pli vasta mondo sen bezono foriri el la komforto de la propra hejmo. Jen ŝanco sensimila.

Kvankam tiuj tri nacioj havis la saman finan celon – repravigi siajn identecojn en la transnacia komunumo kaj havigi al si internacian agnoskon – la maniero, laŭ kiu ili faris tion, malsamis pro iliaj respektivaj politikaj cirkonstancoj. Restante nur el Iberio ni povas analizi, kiel esperantismo interagis kun la naciismaj movadoj de estiĝanta plurnacia ŝtato (Hispanio), nacio sen ŝtato (Katalunio) kaj nacio-ŝtato (Portugalio). Cenzurado, politikaj renversoj kaj puĉoj decidis, kiel tiuj nacioj adaptis la helplingvon kaj la komunumon, kiu aperis ĉirkaŭ ĝi, al siaj bezonoj kaj antaŭkondiĉoj.

Hispanio, konscia pri la kreskanta streĉo inter siaj regionoj, elektis esperantismon de neŭtrala speco, en kiu kastilia naciismo estis pasiva forto. Ĝi ĉeestis en la konstantaj historiaj mencioj kaj la aludoj al granda hispana identeco (kiu ĉiam favoris kastiliajn valorojn kaj idealojn), kiuj plenigis la paĝojn de iliaj revuoj.

Kiel baraktanta nacio sen ŝtato, nacio vekiĝanta post longa dormo, Katalunio eventuale povis multon gajni pro la fleksebleco proponata de Esperanto. La planlingvo malfermis la pordojn al internacia komunumo, kiun katalunaj naciistoj povis aliri sen dependo de la hispana centra registaro. Ili tamen estis ankoraŭ sub la leĝa regado de la ŝtato, kaj cenzurado certe ludis rolon por decidi, kion ili presigu. Tiuj limoj inspiris al ili koncentriĝi pri la malpli disputataj temoj, kiel kulturo kaj lingvo, en provo apartigi sin disde aliaj hispanaj komunumoj.

Portugalio, aliflanke, ne devis trakti pri tiaj problemoj. Neniu vere kontraŭstaris portugalajn naciistojn en la lando, kaj post ilia malsukceso en Afriko, neniu alia mondopotenco rigardis ĝin kiel realan minacon. Tio liberigis ilin por formi esperantismon laŭ siaj naciismaj kaj politikaj opinioj. Verdire la helplingvo ne tiel popularis en Portugalio kiel en Hispanio kaj Katalunio, kaj rektaj fontodokumentoj do estas maloftaj. Tamen la malmultaj fontoj disponeblaj montras klaran naciisman sintenon. Portugalaj esperantistoj klopodis instigi la uzon de Esperanto kiel la solan oficialan internacian lingvon por haltigi la antaŭeniron de la franca, kiu estis trapenetrinta iliajn naciajn kulturon kaj lingvon.

Kvankam diverseco ja estis kerna parto de esperantismo, ĝi kaŭzis ankaŭ miskomprenojn kaj malkonsentojn, kiam temis pri la enstrukturigo de la movado kaj pri la maniero uzi la planlingvon. Kelkaj, kiel la hispanaj esperantistoj, opiniis, ke oni organizu grupojn kaj societojn laŭ la ŝtatoj, al kiuj ili apartenas, kaj ke naciaj konfederacioj reprezentu la regionajn. Aliaj, kiel la katalunaj esperantistoj, taksis la ŝtaton senrilata, ĉar ili interesiĝis nur pri lingvoj, kaj ke oni do organizu la movadon laŭ denaskaj lingvoj kaj regionoj.

Fine oni komencis rigardi la starpunkton de la katalunaj esperantistoj kiel minacon kontraŭ la stabileco de la hispana ŝtato. Sekvis disputoj, kiuj dubindigis la kapablon de la helplingvo tranavigi la mondon tamen konservante sian intence senpolitikan sintenon.

Mia doktoriga projekto esploras tiujn streĉojn, komencante per enkonduko de iberaj esperantistoj kaj la estiĝantaj naciismaj movadoj de la tri nacioj. Ĝi poste pluas por analizi, kiel oni enigis naciismon en esperantismon pere de revuoj, libroj kaj kongresoj, antaŭ ol pritrakti serion da disputoj, kiuj kulminis en 1928 per la ekzigo de la prezidanto de la Kataluna Esperantista Federacio kaj la formala aliĝo de tiu asocio al sia hispana ekvivalento.

Ĉi tiuj esploroj iĝis eblaj pro subvencio de ESF, kiu ebligis al mi viziti la Hispanan Nacian Bibliotekon en Madrido, kaj ankaŭ la Bibliotekon de Katalunio en Barcelono kaj la Arĥivon Petro Nuez en Sabadell.

Pilar Requejo de Lamo venis al la Universitato St Andrews (Skotlando) en 2018 por magistriĝi pri Intelektula Historio kaj kun diplomo pri Internaciaj Rilatoj de la Universitato Reĝo Juan Carlos en Madrido.

Ciferecigo de kroataj gazetoj kunfinancita de ESF

<https://esfconnected.org/2022/12/12/ciferecigo-kroataj-gazetoj/>
<https://library.foi.hr/zbirka/dechr>

Meze de novembro 2022 la nacia Esperanto-arkivo en Kroatio, Dokumenta Esperanto-Centro (DEC), finis tre gravan projekton de ciferecigo de la gazetoj *Konkordo* (1924–1928), *Balkana Konkordo* (1931) kaj *La Suda Stelo* (1932–1973). Temas pri ĉirkaŭ 4200 paĝoj, kiujn laŭ la mendo de DEC ciferecigis la firmao Point s.l.r. en Varaždín.

La projekto en junio 2022 ricevis subvencion de la kroata Ministerio pri Kulturo kaj Komunikiloj en kadro de la protektado de la “tradicio de Esperanto” kiel nemateria kultura heredaĵo de Kroatio n-ro Z-7298, kiu estis proklamita en 2019.

La projekton 50-procente kunfinancis ankaŭ Esperantic Studies Foundation.

Nome de DEC la projekton gvidis Josip Pleadin, kaj nome de Point s.l.r. Danko Tkalec. Pri la plenumita laboro sian pozitivan pritakson al la Ministerio sendis ankaŭ la Konservista fako el Bjelovar, la respondeca regiona institucio pri konservado kaj protektado de kulturaj valoraĵoj.


La gazetoj estas ciferecigitaj kiel PDF-dosieroj kun serĉebla teksto, kaj la rezultoj de la projekto ekde la mezo de novembro 2022 estas konsulteblaj en la reto ĉe la ĉi-supra adreso.

De Esperanto ĝis Dothraki: librorecenzo (2)

Stanislav Košecký

<https://esfconnected.org/2022/12/26/piperski-recenzo-2/>

PIPERSKI, Aleksandr: *Конструирование языков: от эсперанто до дотракийского* ‘La konstruado de lingvoj: de Esperanto ĝis Dothraki’. Moskvo, Alypina Non-Fikšn 2017, 224 paĝoj. ISBN 978-5-91671-1.



Jen la dua parto de longa artikolo verkita de Stanislav Košecký (Slovakio), kies enkondukon ni publikigis en la pasinta numero.

La libro dismembrigas en ses ĉapitrojn. La unua el ili havas la titolon **Neatingebla idealo**, kaj tie la aŭtoro dediĉas sian atenton al filozofiaj lingvoj, kies kreintoj sekvis la celon deflankiĝi de diversaj mallogikaĵoj en naturaj lingvoj. Kiel ekzemplojn li enkondukas la gramatikan genron en multaj lingvoj, poste malperfektaĵojn en la pluralo de substantivoj aŭ en nomaj predikatoj.

Komence li prezentas la projekton **Lingua ignota** de Hildegard von Bingen (1098–1179), unu el la plej gravaj figuroj de la mezepoka germana kulturo. Estas konate, ke ŝi okupiĝis ankaŭ pri medicino kaj muziko. Ŝia lingvo malhavis gramatikajn regulojn kaj ĝiaj ĉirkaŭ 1000 vortoj havis ne nur latinan kaj germanan originon, sed ankaŭ hebrean kaj grekan, kiun tamen ne eblas ofte klare rekonstrui. Krom tio Hildegard ellaboris eĉ la propran skribon, kiu konserviĝis en du manuskriptoj. En tiu ĉi kazo ne eblas paroli pri reala lingvo; eventuale temas pri certa sekreta “lingvo” por privataj sakralaj celoj. Rigardante tiun ĉi realaĵon kun certa toleremo eblas envicigi tiun ĉi verkon kun la filozofiaj lingvoj (verŝajne nur rilate al ĝia historia valoro, laŭ Detlev Blanke).

La **filozofia lingvo** de John Wilkins (publikigita en la jaro 1668) estas la dua projekto, pri kiu la aŭtoro okupiĝas. Li konatigas kun tio, ke Wilkins dividis la sciojn de sia tempo en 40 diversajn klasojn, prezentitajn per po du literoj (konsonanto/vokalo), ekz. *Da* = mondo, *De* = elemento, *Di* = ŝtono, *Do* = metalo, *Ga* = floro, *Ge* = semo, *Gi* = arbusto, *Go* = arbo. Pliaj konsonantoj ebligas dividon de la klasoj en subgrupojn, ekz. *Deb* = flamo, *Ded* = aero, *Deg* = akvo, *Dep* = grundo ktp.

Kiel konstatas Piperski, Wilkins en sia libro montris kvar misojn de samtempaj lingvoj: 1) homonimecon, 2) sinonimecon, 3) malregulaĵojn en gramatiko kaj 4) disiĝon inter sono kaj skribo; kaj konkludis, ke laŭ tio ĉi estus konvene trapensi novan lingvon.

Ro

En la sekva parto de tiu ĉi ĉapitro la aŭtoro atentigas pri la lingvo **Ro** (E.P. Foster, 1913). Li mem enkondukas: “La ortografio de la lingvo Ro certigas kongruon inter literoj kaj sonoj pli unusencan ol en la angla.” La lingvo Ro ĝenerale okulfrape similas al la lingvo de Wilkins: en ambaŭ lingvoj la vorto komenciĝas per signo de la klaso, kio ebligas taksi, pri kio la parolo temas.

Sekvas pli detala klarigo de la strukturo de tiu ĉi lingvo. Ro ne transprenas radikojn aŭ radikvortojn el la latina kaj aliaj lingvoj. Kiel akcentis la aŭtoro de Ro, la vortoj tie ĉi baziĝas sur analizo de ideoj kaj ili estas konstruitaj laŭ apriora principo, laŭ kiu la komenca litero aŭ komenca silabo regas la vorton kaj la ceteraj literoj prezentas unuon aŭ kategoriigon surbaze de scienca klasifiko. La baza principo laŭ Piperski estas, ke la komenca silabo neniam havas sian signifon. Temas do pri filozofia lingvo.

Kiel ekzemplo estas prezentata la sistemo de numeroj, kiuj ĉiam komenciĝas per *z*. Tiel *zab* estas 1, *zeb* 10, *zib* 100. Poste *zidzab* estas 301, *zifzeb* 410, *zifzefzaf* 444. Tia alfabeto regulo aplikiĝas ankaŭ en aliaj kazoj – poste *dec* signifas vastecon, *decab* estas linio, *decac* malvasta kiel fadeno, *decac* meze vasta, *decac* vasta, *decac* tutmonda, *decac* senlima.

La aŭtoro de la libro atentigas ankaŭ pri kelkaj gramatikaj reguloj: ekz. en propozicioj kutime aperas vorto kun radiko *-e-*, kiu signas verbecon, plej ofte *ek* la estintan tempon, *el* estantan tempon, *em* estontan. Tamen, kiel li plie notetas, Foster mem de loko al loko forkliniĝas de la ideo de aprioro, ebligante la ekziston de certaj aposterioraj elementoj de sia lingvo. Tiel ekzemple la vortoj komenciĝantaj per *l-* signas nociojn ligitajn kun la vivo; dume la komenca *l* venas de la angla *life* kaj la germana *Leben*. Poste ankaŭ la vorto *ha* certe havas sian originon en la angla *have*, kaj en la vorto *gerdo* estas distingebla *do-* el la vorto *dolaro*.

Kiel konstatas la aŭtoro de la recenzata verko, la lingvo Ro ne atingis disvastiĝon, kaj en la medio de artefaritaj/planaj lingvoj okupis pli gravan rolon aliaj pli nuntempaj projektoj, kiujn la aŭtoro mencias en la posta teksto.

Loglan

Studo pri **Loglan** aperis unuafoje en la ĵurnalo *Scientific American*. Ĝia aŭtoro estis sociologo James C. Brown. Tiu ĉi publikaĵo aperis laŭ Piperski en la tempo, kiam intereso pri logik-filozofiaj lingvoj jam malfloradis. La projekto Loglan (*Logical Language*) estis unu el la lastaj, kiuj provis apliki la “universalan” lingvon. Ĝi tamen respektis ekzistantajn naturajn (precipe signifplenajn) lingvojn.

Por krei ĝian leksikan materialon, orientiĝis Brown laŭ ok lingvoj: la angla, ĉina, hindia, rusa, hispana, japana, franca, germana. Kiel ekzemplon tie ĉi la aŭtoro enkondukas la vorton *blanu* (blua). Per komparo de tiu ĉi nocio kun tiuj ĉi ok lingvoj (konservante la transliteradon kaj transskribadon uzatajn de Brown) li prezentas ĝian t.n. indekson de lernebleco de 0 (tre malalta) ĝis 1 (tre alta), kiu laŭ Brown aspektis jene:

- ◆ angla (*blue*) $3/3 = 1$
- ◆ ĉina (*lan*) $3/3 = 1$
- ◆ hindia (*nila*) $2/4 = 0,5$
- ◆ rusa (*galuboj*) $2/7 = 0,28$
- ◆ hispana (*azul*) $2/4 = 0,5$
- ◆ japana (*ao* aŭ *kon*) $0 = 0$
- ◆ franca (*bleu*) $2/3 = 0,66$
- ◆ germana (*blau*) $4/4 = 1$

(La unua datumo, $3/3$, $2/4$ ktp, signas la t.n. kvoton de kongruo.)

Kiel atentigas la aŭtoro, se oni tiujn ĉi kriteriojn evitus, povus ekesti vortoj de libervola longeco kaj poste la nocio “blua” povus aspekti jene: *blulannilagalubojasulaokonbleublau*. Sed tia ĉi “mensoga” ekzemplo ne validas, kiel skribas la aŭtoro, ĉar la predikatoj de Loglan havas rigore starigitan strukturon: *KKVKK* aŭ *KVKKV*.

Ankoraŭ estas utile mencii, ke Brown eldonis en la jaro 1975 detalan gramatikon de Loglan, por pli-malpli regi ĝian evoluon. La aŭtoro de la libro aldonas ankoraŭ informon pri nova projekto de logika lingvo, kiu aperis en la jaro 1987. Ĝiaj aŭtoroj (B. LeChevalier kaj N. Tansky) nomis ĝin Lojban. Ankaŭ tiu ĉi estis konstruita sur principo de logika lingvo, sed ĝia leksiko tre diferenciĝas de Loglan.

Fine la aŭtoro de la verko mencias, ke en eĉ ne unu kazo de filozofia lingvo oni sukcesis montri, ĉu ĝi havas influon sur pensadon rilate la hipotezon de Sapir-Whorf, ĉar neniu ellernis aŭ Loglan aŭ Lojban kiel gepatran lingvon, kaj ni do ne scias, ĉu la pensado de iliaj parolantoj diferenciĝus de la nia.

Toki Pona

En plia klarigo de tiu ĉi ĉapitro okupiĝas Piperski pri du pli novaj projektoj de planlingvoj. La unua el ili estas **Toki Pona**. Temas pri projekto de la aŭtorino S. Lang. En la jaro 2014 ŝi eldonis kompletan gramatikon de tiu ĉi lingvo kiel “The Language of Good”. En tiu ĉi lingvo troviĝas ĉ. 120 vortoj, kiuj kombiniĝas laŭ simplaj reguloj. Toki Pona nome konsistas el la vortoj *toki* (lingvo, paroli) kaj *pona* (bona, bono).

La celo de Toki Pona estas instrui homojn dividi la pensadon en bazajn partojn kaj surbaze de tio pensi filozofie kaj pli profunde percepti la mondon. En la sistemo de numeraloj estas nur kvin vortoj: *wan* “1”, *tu* “2”, *luka* “5”, *mute* “20”, *ale* “100”. Ekz. “77” oni diras kiel *mute mute mute luka luka luka tu tu*. Ĉe rigardo al la vortprovizo estas okulfrape, ke Toki Pona estas

aposteriora lingvo. La vortoj *wan*, *tu*, *luka* (laŭ la kroata *rúka*), kiel ankaŭ *oko* “okulo”, tion klare pruvas. En tiu ĉi lingvo la fonetiko estas prezentata per nur naŭ konsonantoj kaj kvin vokaloj.

Ithkuil

La lasta lingvo de la unua ĉapitro, kiun Piperski prezentas, estas **Ithkuil**.

Tiu ĉi projekto aperis unuafoje en interreto en la jaro 2004. Ĝia aŭtoro J. Quijada ĝin pli prilaboris en la jaro 2007 kaj ĝian finan version li prezentis en la jaro 2011. Laŭ la aŭtoro de la libro temas pri logike-filozofia lingvo, kies celo estas atingi la plej altan nivelon de precizeco kaj efikeco, ellasante polisemion (plursencecon). Ĝia signa strukturo enhavas 45 konsonantojn kaj 13 vokalojn, kiuj povas kreadi diftongojn. Krom tio, en tiu ĉi lingvo estas uzataj tonoj, kiuj estas 7, kaj laŭ la alto de la voĉo ili povas ŝanĝi la sencon (la norma ĉina havas 4 tiajn tonojn). En la gramatiko de Ithkuil estas krom tio 96 kazoj kaj pli ol 20 verbaj gramatikaj kategorioj. La alproprigon de tiu ĉi lingvo malfaciligas eĉ tio, ke ĝi havas apartan sistemon de skribo, kiu ne havas fonan formon. (Detaloj pri tiu lingvo troviĝas en la interreto ĉe ithkuil.net.)

En la fino de tiu ĉi ĉapitro Piperski demandas, ĉu eblas plibonigi la pensadon helpe de lingvo. Lia rimarkigo pri tio, ke fakte eĉ ne estas klare, kion signifas plibonigi la pensadon, estas tute trafa. Plue li demandas: ĉu homa pensado fariĝus pli bona, se ni pensus maksimume klare, envicigante delikatajn aspektojn de la signifo kiel en Ithkuil, aŭ male, se ni seniĝus je nenecesaj delikataĵoj kiel en Toki Pona? Kaj li finas siajn demandojn per starigo de la problemo, ĉu pensado en kategorioj de predikatlogiko ebligus pli bone diferencigi la veron de la malvero.

Al tiuj ĉi demandoj ne ekzistas respondoj, diras Piperski, ĉar ne ekzistas homoj, kiuj per nomitaj filozofiaj lingvoj parolus kiel per gepatraj. Kaj la ĉapitron **Neatingebla idealo** li finas per konstato, ke la demando de filozofiaj lingvoj restas malfermita kaj, laŭŝajne, plu restos tia.

Internacia Konferenco de Aplikata Lingvoscienco

<https://esfconnected.org/2022/10/03/international-conference-applied-linguistics/>

<https://10times.com/e13r-gpkd-k951>

La Filologia Fakultato de Vilno-Universitato, Fako pri Litovaj Studoj, la Litova Asocio pri Aplikata Lingvoscienco (LITAKA) kaj la Instituto de la Litova Lingvo okazigis la Sesan Internacian Konferencon de Aplikata Lingvoscienco en oktobro pri la temo “Lingvoj kaj homoj: problemoj kaj solvoj”.

Nova libro pri Esperanta morfologio

<https://esfconnected.org/2022/10/05/new-book-morphology/>

<https://sezonoj.ru/2022/09/eme/>

En la 56aj Baltiaj Esperanto-Tagoj pasintsomere en Klajpedo, Ryszard Rokicki prezentis sian novan libron *Enkonduko en la morfologion de Esperanto*. Rokicki dum preskaŭ 50 jaroj okupiĝas pri esperantologio.

Konferenco pri edukado, literaturo kaj lingvo

<https://esfconnected.org/2022/10/07/conference-education-literature-language/>

<https://londoninstitutesd.co.uk/aricell-2022-cambridge/>

London Institute of Skills Development (Londona Instituto por Evoluigi Lertojn) gastigis la Internacian Konferencon de Aplikata Esplorado pri Edukado, Literaturo kaj Lingvo en la Universitato de Kembriĝo (Britujo) inter la 3-a kaj 5-a de novembro pasintjare. Tie universitatanoj, praktikistoj, fakuloj, esploristoj kaj politikformantoj el diversaj fonoj kaj spertoj prezentis referaĵojn kaj interŝanĝos kaj komunikos siajn spertojn, novajn ideojn, rezultojn, defiojn kaj solvojn.

Beboj kaj kontrastaj sonoj

<https://esfconnected.org/2022/10/12/babies-contrastive-sounds/>

<https://www.pnas.org/doi/10.1073/iti3822119>

<https://khitczenko.github.io/ContextLong.pdf>

Lastatempa studaĵo prilumas, kiel beboj lernas distingi kontrastigajn sonojn (*bano, pano*) en la propra lingvo, tamen rapide perdante la kapablon distingi la kontrastigajn sonojn de aliaj lingvoj. Profundigante sian antaŭan esploron, la aŭtoroj proponas, ke beboj komparas la frekvencan distribuon de sonoj tra diversaj situacioj.

Ŝekspiraj mitoj

<https://esfconnected.org/2022/10/14/shakespeare-myths/>

<https://theconversation.com/five-myths-about-shakespeares-contribution-to-the-english-language-189402>

Mallonga anglalingva artikolo diskutas kvin mitojn pri la kontribuoj de Ŝekspiro al tiu lingvo.

Atentu vian lingvon

<https://esfconnected.org/2022/10/17/watch-your-language/>

<https://www.insidehighered.com/blogs/higher-ed-gamma/watch-your-language>

Lastatempa artikolo de Steven Mintz, profesoro de historio ĉe la Universitato de Teksaso en Aŭstino (Usono), ekzamenas, kiel lingvo iĝis kerna batalkampoj kultura, ideologia kaj politika: “El ĉiuj tradiciaj fakoj de la homaj sciencoj, nur unu konstante kreskis: lingvistiko.”

AI lernas homlingvajjn strukturojn

<https://esfconnected.org/2022/10/19/ai-human-language-patterns/>

<https://news.mit.edu/2022/ai-learn-patterns-language-0830>

Nova maŝinlerna modelo kapablas memstare malkovri lingvajn regulojn, kiuj ofte kongruas kun tiuj kreitaj de homaj fakuloj. Homaj lingvoj estas fifame kompleksaj, kaj lingvistoj delonge kredis, ke ne eblas instrui maŝinon analizi parolsonojn kaj vortostrukturojn tiel, kiel faras homaj esploristoj.

Pensado per la manoj

<https://esfconnected.org/2022/10/21/thinking-with-hands/>

<https://www.sciencedaily.com/releases/2022/09/220915104800.htm>

Demonstro de perkorpaj kognaj meĥanismoj en la cerbo povus esti signifohava por artefarita intelekto. En lastatempa studo sciencistoj observis, kiel la cerbo respondas al vortoj prezentantaj mane manipuleblajn objektojn, kiam la manoj de partoprenanto estis jen libere moveblaj, jen malliberigitaj. Oni montris, ke la aktivado de la cerbo responde al tiaj vortoj konsiderinde malpliĝis, kiam la manoj ne povis moviĝi.

3-a Virtuala Kongreso kaj Retoso

<https://esfconnected.org/2022/11/07/vk3-retoso/>

<https://vk.esperanto.net/2022/>

<https://retoso2022.tejo.org/>

La 3-a Virtuala Kongreso de Esperanto okazis de la 24-a ĝis la 27-a de novembro 2022 kune kun Retoso, la reta evento de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo).

La kerna programo de la 3-a VK, kiu ĉiutage etendiĝis de la 12h00 ĝis la 18h00 UTC, enhavis prelegojn, panelojn, debatojn, aŭtorajn momentojn, artajn kaj kulturajn prezentojn ks. Kontribuoj rilataj al la kongresa temo, “Lingvo, vivo, tero: Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj”, estis speciale bonvenaj.

Oratora Konkurso

<https://esfconnected.org/2022/11/08/public-speaking-competition/>

<https://uea.org/gk/1074a1>

<https://uea.org/gk/1073a1>

Kiel parto de la 3-a Virtuala Kongreso de Esperanto okazis Oratora Konkurso por la junularo, malfermita al aliĝintaj gejunuloj malpli ol 36-jaraj.

Konkursantoj devis paroli en Esperanto ĝis dek minutoj pri unu el la jenaj temoj: “Kiam indiĝena lingvo mortas...”, “Indiĝenaj lingvoj pluvivus, se...”, “Mi aparte ŝatas mian indiĝenan lingvon, ĉar...”

Surloke kaj distance, serioze kaj amike

<https://esfconnected.org/2022/11/10/on-site-remote/>

<https://edukado.net/novajhoj?id=878>

Jen raporto pri la interlingvistika sesio okazinta parte en la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano (Pollando) kaj parte virtuale en septembro pasintjare.

Ŝanĝi la difinon de amo

<https://esfconnected.org/2022/11/11/changing-definition-love/>

<https://spectator.sme.sk/c/23059621/linguists-changing-the-definition-of-love-was-the-least-we-could-do.html>

La difino de la vorto *lásk*a “amo” en la Vortaro de la Aktuala Slovaka Lingvo ne plu indikas geecon, tiel spegulante la realon. Ĉi tiu artikolo (anglalingve) diskutas, kial la ŝanĝo okazis en la semajno post terorisma atako en Strato Zámocká (Bratislavo), kiu mortigis du GLAT-anojn, kaj kiel la nova difino eble influos la socion.

La estontecto de lingva diverseco

<https://esfconnected.org/2022/11/16/future-linguistic-diversity/>

<https://www.nature.com/articles/s41559-021-01604-y>

Studo en la anglalingva revuo *Naturo* trovas, ke kontakto kun aliaj lingvoj ne kaŭzas lingvoperdon, sed ke formala edukado kaj pli densa vojreto povas tiel agi.

IKU-prelegoj petataj por Torino

<https://esfconnected.org/2022/11/18/call-for-iku-talks/>

<https://uea.org/gk/1072a1>

Kadre de la 108-a UK en Torino okazos la 76-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato (IKU). UEA invitas proponojn por IKU-prelegoj, sendotajn ĝis la 31-a de januaro 2023. Lige kun la IKU okazos studsesio de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS). Kandidatoj por IKU-prelego povas samtempe proponi AIS-kurson, kiu konsistos el unu IKU-prelego, 1-2 kromaj prelegoj kaj eventuale ekzameneto.

Marjorie Boulton: Unu animo homa

<https://esfconnected.org/2022/11/21/unu-animo-homa/>

<https://esperanto.org.uk/news/publishing/unu-animo-homa-r156/>

Aperis du-voluma kolekto de la plena poezia verkaro de Marjorie Boulton ĉe Esperanto-Asocio de Britio. Pli ol 1200 paĝojn longa, *Unu animo homa*, titolo tiritita el ŝia poemo “Aliĝilo”, enhavas ĉiujn ŝiajn poem-librojn, komencante per *Kontralte*, per kiu ŝi surscenejiĝis en 1955, ĝis *Du el*, eldonita tridek jarojn poste.

AI starigas demandojn pri denaska gramatiko

<https://esfconnected.org/2022/11/23/ai-innate-grammar/>

<https://theconversation.com/ai-is-changing-scientists-understanding-of-language-learning-and-raising-questions-about-an-innate-grammar-190594>

Jam jarojn multaj lingvistoj kredis, ke ne eblas lerni lingvon sen denaska gramatik-ŝablono. Sed novaj AI-modeloj kiel GPT-3 pruvas alie, montrante, ke la kapablon produkti laŭgramatikan lingvaĵon oni povas lerni per lingva sperto ekskluzive.

Albeba parolado similas en multaj lingvoj

<https://esfconnected.org/2022/11/25/baby-talk/>

<https://www.sciencedaily.com/releases/2022/10/221011105727.htm>

Lastatempa esploro malkovris, ke albeba parolado havas similajn ecojn tra 36 lingvoj. Zorgantoj ĝenerale parolas al infanetoj en alttona, malrapida, vigla maniero.

Lingvistiko kaj falsaj novaĵoj?

<https://esfconnected.org/2022/11/30/linguistics-fake-news/>

<https://partner.sciencenorway.no/linguistics-media-society/can-linguistics-expose-fake-news/2085020>

Lingvistika teamo ĉe la Universitato de Oslo laboras kun komputosciencistoj kaj esploristoj pri artefarita intelekto por eltrovi, ĉu ekzistas lingvaj diferencoj inter tekstoj de veraj kaj falsaj novaĵoj en la norvega, la angla kaj la rusa. Ili celas plibonigi la jamajn faktokontrolilojn.

La potenco de lingvoplanado

<https://esfconnected.org/2022/12/07/power-language-planning/>

<https://languagepolicyconsulting.com/2021/09/22/lets-start-at-the-beginning-language-planning-%f0%9f%93%9d/>

Artikolo sub la titolo “Antaŭ ol ekzistis lingvopolitiko, ekzistis lingvoplanado”, afiŝita en septembro 2021, diskutas la celojn kaj sekvojn de lingvoplanado.

Povo, volupto kaj zinko

<https://esfconnected.org/2022/12/14/power-lust-zinc/>

https://eo.wikipedia.org/wiki/Moresnet_ne%C5%ADtrala

<https://www.bureau-europa.nl/macht-wellust-en-zink/download/7860/ZINK-NL-3mmafloop-40p-fogra39-DEF.pdf>

De la 4-a ĝis la 12-a de decembro 2021 estis en Maastricht (Nederlando) ekspozicio *Macht, Wellust en Zink* (“Povo, volupto kaj zinko”), kiu per historiaj dokumentoj kaj modernaj instalaĵoj rakontis la historion de la industria pejzaĝo kaj de Neŭtrala Moresnet. Okaze de tiu ekspozicio aperis samtitola libro en la nederlanda lingvo, kun kvinpaĝa ĉapitro pri Neŭtrala Moresnet aŭ Amikejo kaj la rolo de Esperanto en ĝi.

STIPENDIOJ DE ESF

Esperantic Studies Foundation havas du subvenciajn programojn: unu por Interlingvistika Subteno kaj alia por Ĝenerala Subteno.

Programo por Interlingvistika Subteno (IS)

Tio estas administrata de internacia komisiono sub aŭspicio de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). Ĝi aljuĝas malgrandajn subvenciojn, kutime malpli ol 2000 usonaj dolaroj, por helpi fakulojn kaj jam spertajn studentojn plenumi esplorojn en la fakoj lingvoplanado, interlingvistiko, transnacia lingva politiko, lingva justeco, kaj planlingvoj (inkluzive Esperanton). La subvencioj povas subteni aĉeton de (aŭ aliron al) esploraj materialoj, partoprenon en konferencoj, vojaĝadon al esplorbibliotekoj, subtenon de surkampa laboro, evoluigon de retejoj, kostojn de publikigo, k.s. Subvencioj IS estas aljuĝataj konkurse kaj kutime devas esti uzataj ene de unu jaro post ricevo de la subvencio.

Programo por Ĝenerala Subteno (ĜS)

Tio kovras ĉiujn tri aktualajn prioritatojn de ESF: Esploradon, Edukadon kaj Konservadon. Ĝi estas malferma al individuoj kaj organizaĵoj, inkluzive de universitatoj. Subvenciojn oni aljuĝas konkurse. Kvankam plej multaj subvencioj estas malgrandaj kaj kutime devas esti uzataj ene de unu jaro post ricevo, foje subvencioj estas aljuĝataj por pli longaj periodoj kaj en pli grandaj sumoj. Antaŭ ol peti subtenon, estas konsilinde sendi mallongan mesaĝon al admin@esperantic.org, por demandi ĉu la propono taŭgas. Petoj ĜS estas traktataj de subkomitato de la Estraro de ESF. Petoj ĜS, kiuj tamen kongruas kun la gvidlinioj IS, estos plusendataj al la Komisiono IS.

Limdatoj

Ekzistas tri limdatoj ĉiujare por subvencipetoj, en ambaŭ ĉi-supraj programoj:

- ◆ 31-a de januaro
- ◆ 30-a de aprilo
- ◆ 30-a de septembro

Por pli da informoj, bonvolu viziti: <https://www.esperantic.org/eo/stipendioj/stipendioj-de-esf>

IpI estas eldonaĵo de Esperantic Studies Foundation (ESF) en la nomo de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA), Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. ISSN 1385-2191. Paralela anglalingva versio, *Information for Interlinguists (IfI)* estas ankaŭ disponebla. La enhavo de ambaŭ kutime aperas pli frue en la blogo [ESF Connected](#). Ĉi tiun numeron redaktis Simon Davies.

Por ricevi avizojn pri estontaj numeroj, aŭ por sendi eldonotajn informojn, retmesaĝu al ipi@esperantic.org aŭ contact@esfconnect.org. Limdato por la venonta numero: 31-a de marto 2023. Kontribuaĵoj el ĉiuj mondaj regionoj estas bonvenaj. Ni akceptas materialon en Esperanto aŭ la angla, aŭ ideale kiel la saman tekston tradukitan en ambaŭ lingvoj.

ESF en la reto: www.esperantic.org, esfacademic.org, esfconnected.org, interlingvistiko.net, www.facebook.com/esperantic. Tvitero: [@esperanticsf](https://twitter.com/esperanticsf), [@esfacademic](https://twitter.com/esfacademic).

Estraro de CED

Mark Fettes (direktoro), Guilherme Fians, Snehaja Venkatesh, Klaus Schubert, Humphrey Tonkin kaj Michele Gazzola.